

世界语与汉语对照读物

MIKRONOVELOJ DE SIN'ITI HOSI

[日] 星新一

微型小说选

陈剑彤 译

张海平 校

北京航空學院出版社

世界语与汉语对照读物

〈日〉星新一微型小说选

陈剑彤译 张海平校

责任编辑 胡益民

北京航空学院出版社出版

新华书店北京发行所发行 各地新华书店经售

北京航空学院印刷厂印装

*

787×1092 1/32 印张：4 字数：899 千字

1986年9月第一版 1986年9月第一次印刷 印数：7500 册

统一书号：9432·035 定价：0.9 元

前 言

现在是信息时代。世界语是信息社会最理想的工具。近年来，用世界语来进行国际交往也日益频繁；热爱或想学世界语的人越来越多。我国的世界语学习热潮受到了政府和各界人士的高度重视。发展非常迅速：许多的省市正式成立了世界语协会或世界语协会（筹）；几十个城市开办了各种程度的讲习班或举办世界语函授教育；不少高等学校开设了世界语选修课或学习班。为了适应当前这种形势，满足国内读者对世界语读物要求的迫切愿望。翻译了松叶菊延先生世界语的《星新一微型小说选》，并以世汉对照的形式出版。这本书无论在内容、形式以及在界语传神的翻译技巧上，都是十分出色的。相信此书对广大世界语读者是会有所帮助和提高的。这正是译者的目的及愿望。但由于译者水平有限，错误在所难免，望批评指正。本书在翻译过程中受到世界语界各位老前辈的关怀和~~帮助~~，~~在此~~深表谢意。

译者

1986·春 于北京

内容简介

星新一是日本小小说之父，世界著名的微型小说家。本书是从他所发表的九百六十篇微型小说中，根据松叶菊延先生的世界语译本翻译，精选出来的十三篇小说。内容广泛、词汇丰富、趣味性强、构思新颖。包括有科学幻想、探案、抨击和揭露资本主义社会的弊端等文章。加之松叶菊延先生传神的世界语翻译技巧，更使这些作品锦上添花。是世界语教学和自学的参考书。

目 录

Oazo	1
绿洲.....	2
Katastrofo	4
不测之祸.....	11
La amata horlogo	18
心爱的表.....	20
Fakulo	23
专家.....	28
Flustro de demono	33
恶魔的悄悄话.....	40
La vaganta hundo	46
徘徊的狗.....	47
La grandioza plano	49
宏大的计划.....	54
Vivo skrupule zorgata	58
照顾得无微不至的生活.....	63
La ŝtelita papero	68
被窃的文件.....	70
La memora foto	73
纪念照.....	77
Mi estas murdistino	81
我是女职业谋杀者.....	86
Sur la nokta vojeto	92
在夜间的小路上.....	94

Oazo

“Ha, terure. Kiel mi soifas akvon!”

“Same ankaŭ mi!”

Sole sekeco regis la internon de la kosmoŝipo. Ĉiu sopiris akvon. Paneo de la aparato rekolekti akvon el la ekskremento, rezultigis el la provizo po ĉirkaŭ glaso da akvo por ĉiu ŝipano en la sekvantaj 24 horoj.

“Iom pli da pacienco! Ni devas povi trovi ĉirkaŭ ni astron kun akvo,” penis retrankviligi la kapitano.

La kosmoŝipo povis fari nenion krom nur flugadi plu kun sola espero je liaj vortoj. Kaj...fine ĝi sukcesis trovi etan punkton diste en la spaco.

“Vidu, jen astro! Probable la astro!” kriis unu ŝipano per raŭka voĉo.

La kapitano estis tamen diskreta, senemocia:

“Atendu! Ne hastu ĝoji! Esploru atente kaj detale. Soifulo povas ofte havi iluzion. Vin atakus absoluta malespero, se vi post alproksimiĝo trovos, ke vi estis iluziitaj.”

Baldaŭ raporto venis de la observisto:

“Ĉiel certe. Ŝajnas, ke la astro havas riĉan provizon da akvo. Jen rigardu kion indikas la

spektro. La observaparato neniam nin iluzias!
Absolute certas la ekzisto de akvo.”

La ĝenerala jubilado ne plu estis subpremebla. En la mezo de tiu jubilado alproksimiĝis la planedo, blua kaj brilanta.

“Akvo, akvo!”

“Ni trinkos akvon! Ni povos per akvo regali nian korpon mumie elsekigitan!”

“Hej, rapidu surteriĝi! Kial vi hezitas? For vian afektadon!”

Tra la ĝenerala gaja ridado, nun sonis trista voĉo de la stiristo:

“Surteriĝu? Nu, kiel surteriĝi tie, kie la tutan surfacon regas nur akvo, ne lasante eĉ unu insuleton? ...”

绿 洲

“嘿，真糟糕。我渴得要命!”

“我也是!”

干燥统治着宇宙飞船的整个内部。每个人都渴望着水。由于从排泄物及污水中回收水的净化装置出了故障，每个宇航员二十四小时只能得到不满一杯水的供应了。

“坚持住! 在我们周围一定能找到一座有水的星。”船长努力安慰着大家。

他的话是这艘除了不停地飞，什么也干不了的宇宙飞船的唯一希望。并且……最后它成功地在这无边的空间找到了一个极小的小点儿。

“看，是星！可能就是一座星！”一个船员用沙哑的嗓子喊。

然而，做事谨慎的船长却无动于衷地说：

“等等！先别高兴！注意详细地探查。饥渴的人经常会发生迷惑。如果你到近前发现自己是错觉，那会使得你所有的希望完全破灭而灰心丧气。”

过了一会，观测员来报告：

“千真万确。好象这座星上有着丰富的水资源。

喏，看，光谱指示着什么！监测装置是永远不会产生错觉的！绝对的，确确实实有水！”

全体人员按捺不住兴奋的心情欢呼起来。在这欢呼声中驶近那兰色的，发着亮光的星。

“水，水！”

“我们就要喝到水啦！我们能用水款待我们干巴得像木乃伊似的身体了！”

“嘿，快着陆吧！你还犹豫什么？快别装腔作势啦！”

这时，穿过全体宇航员愉快的笑声，响起了驾驶员悲哀的声音：

“着陆？说的好，怎么在哪儿着陆？这座星的表面全都是水，甚至连一个极小的小岛也没有。”……

Katastrofo

Malgranda kosmoŝipo daŭriganta sian flugadon tra la kosmo ŝajne kuntuŝiĝis kun aerolito, kaj ricevis teruran skuon.

“Ho ve! Io eksterordinara sekvos!” murmuris s-ro N., rigardante super la aparataron sur la pilota seĝo.

Li estas fotisto. Fotadi planedon post planedo estis lia okupo.

Ne gravas tamen en kio li sin okupas: gravas nur, ke ia malordo lokon havis en la dinamo kaj la komunikilaro. La kosmoŝipo baldaŭ suferos veturan nekapablon, kvankam la rezervita elekto laboros por iom pli da tempo.

S-ro N. elprenis la broŝuron, kiu instrukcias kion fari en okazo de krizo. Jen kion li legas tie:

“Estu tranĉvila. Antaŭ ĉio lanĉu sparksignalan buon en la eksteran spacon. Nun surteriĝu sur la plej proksiman astron, kaj tie atendu. Vi estos nepre trovita kaj savita, ĉar kiam vi ne revenos la Teron ĝis la dato ekspektata sur la vojaĝlisto, kiun vi anticipe prezentis, la Kosma Savtrupo ekstartos vin serĉi laŭ la de vi irita vojo.”

Resume do, pasos longa tempo, sed li estos iel

savita. Nenia rimedo alia ol observi tiun instrukcion.

S-ro N. iele stiris la kosmoŝipon, kaj surteriĝis sur proksiman planedon. Tio ĉi estas astro, malgranda, kaj dezerta nur el rokoj; vivaĵoj troveblis nenie. La rezervita elektropovo elĉerpiĝis baldaŭ post la suraŝtiĝo. Sed li estis tamen trankvila. Da kosmomangoj estis abunde rezervitaj. Sufiĉos nur atendi la alvenon de la Savtrupo, dume mangante ilin.

Li elprenis iom da raketa brulaĵo, varmigis kafon kaj ĝin trinkis.

Kiam lia koro eksentis plenan repaciĝon, li demandis al si, kion li faru de nun, sed li trovis nenion por fari. Li pentis, ke li kunportis nenion por legi, sed nenio jam helpas.

Li gimnastikis en la kosmoŝipo ĝis li laciĝis, kaj dormis.

Kelkaj tagoj forpasis kun li tiamaniere. Sed ĉiutage nur la ripeto de mango, gimnastiko kaj dormo. Nenio estas pli enua ol solula gimnastiko sen akompano de muziko, kaj li baldaŭ ĉesigis la gimnastikon.

La neniofarado lin tedis. Li do provis amuze disskribi kaj desegni sur la muro de la kosmoŝipo, kio tamen nelonge daŭris. Lin ne interesas mem rigardi kion li mem desegnis aŭ mem disskribis. Baldaŭ la muro estis kovrita per literoj kaj desegnaĵoj, kaj s-ro N. ĉesigis la mur-amuziĝon.

Poste li trovis ion pli komplikan por sin distri.

Nome li ekstraktis el la raketa brulaĵo alkoholon, faris el ĝi ebrigaĵon kaj trinkis. Li trinkis ĝin kaj kantis; kantis tiom multe da kantoj, kiom li povis rememori. Sed lia naturo ne interesiĝis kanti, ĉu antaŭ aŭskultanto, ĉu en kompanio. Kaj la kantado ĉesis kun la elĉerpiĝo de lia repertuaro.

Nelonge daŭris ankaŭ ĉiuj aliaj provoj, kiujn li elpensis unu post la alia. Kaj kiam pasis pli malpli unu monato, li ne plu sciis kion fari. Lin okupis absoluta tedo. Kiel pasigi la tempon ĝis la alveno de la Savtrupo? La kalkulo montras, ke ĝi alvenos ja post kvin monatoj, se plej frue. Kion fari dume? Teruro lin atakis. Lia cerbo eventuale perdis la ekvilibron!

S-ro N. provis eliri el la ŝipo por promeni. Li jam pli frue pensis pri promeno, sed la troa monotoneco de la ĉirkaŭo subpremadis al li praktiki la ideon. En la astro tuta el rokoj sen vivaĵoj, nenio povis lin interesi.

Promeno estus tamen pli signifa ol sidi senfare. Li sin ekipis per kosma kostumo kaj eliris eksteren.

Mallongan tempon li promenis, sed li trovis nenion novan, kiel li pli frue supozis. Kiam li ekvolis iri returnen, io eksterordinara tamen kaptis lian atenton.

Ĝi havas formon de renversita lilifloro, alta ĉirkaŭ tri metrojn, kaj havis koloron freŝe flavan.

“Kio tio povas esti?” ellasis streĉitan krion s-ro N. Ke li trovas tian objekton sur la tero de tiel dezerta astro! Dum li ĝin rigardis, frosto lin atakis,

kaj li galope revenis al la kosmoŝipo.
Urĝe li pretigis zorge por si armilon por
okazo de eventuala krizo. Ne plu io
teda por li ! Kio ĝi povas esti ? Li

streĉis sian imagon vane por
solvi la aferon, kompreneble.

Pensado sola nenion utilas.
S-ro N. elprenis do telefotilon,
kaj fotis de certa distanco la
objekton.

La rivelitaj filmoj liveris al li
plurajn faktojn. Ŝajne la
objekto estas arte konstruita,
kion li divenis per iaj signoj
ĉizitaj sur la ekstero de la
objekto. Ili ŝajnas aŭ kiel
hieroglifoj aŭ kiel iaj signoj aŭ
desegnaĵoj sen aparta signifo. Sed
ĉio cetera restis al li sub mistera
masko.

Grandega maltrankvilo regis
s-ron N. Ĉiutage li eliris el la
kosmoŝipo por rigardi la
objekton, kaj ĉiufoje li poiome
pliproksimiĝis al ĝi. Fine li
timeme etendis sian manon kaj
ĝin tuŝis. Nenia penado lia tamen
utilis al li por scii, kio ĝi efektive
estas.

Strangaforma flava konstruaĵo

ĉirkaŭ tri metrojn alta kun misteraj
ĉizaĵoj — jen ĉio kion li konas.

S-ro N. starigas unu hipotezon: la
objekto estas konstruita de iaj
kosmanoj. Sed kiaj kosmanoj kaj por
kia celo? Nun lia bela hipotezo
subite perdis plian disvolviĝon.

Interna esploro helpus la
komprenon, sed li ne emis
facilanime tion fari. Kion fari, se
lin alsaltus monstra besto el
metalo, kiu vivus en la
konstruaĵo? Ne veku malfeliĉon,
kiam ĝi dormas.

S-ro N. ĉiutage ripetis la
promenadon inter la kosmoŝipo
kaj la stranga objekto. Ĉiufoje li
demandis sin, kio estas en la interno,
sed li ne povis ekscii.

Timeme li frapis la objekton. Nenia
reago. Ju pli pasis la tagoj, des pli
fortiĝis lia frapado. Nenia reago,
ĉiufoje.

Lia scivolemo pri la enigmo
dume kreskis kaj kreskis ĝis ĝi
fariĝis apenaŭ subpremebla por li.

Fine s-ro N. decidis bori la objekton.
Sed li ne sciis kiel bori la nekonatan
materion. La borilo trovis la materion
tro malmola. Aplikitaj kemiaĵoj ankaŭ



montriĝis senefikaj. Sed kiam li fokusis sur ĝi flamon de raketa brulaĵo, s-ro N. sukcesis fari etan truon.

Interne vidiĝis metitaj unu sur la alia skatoloj kvadrataj kun ĉirkaŭ 20-centimetra laterlongo. Nenio pli. Kio do ili estas? Li pligrandigis la truon en la muro, prenis en la manon unu skatolon, kaj ĝin portis kun si al la kosmoŝipo.

Kion entenas la skatolo? Ankaŭ sur la skatolo troviĝis iaj misteraj signoj aŭ desegnaĵoj. Se mi nur komprenus ilin! — li iritiĝis. Sed malgraŭ ĉia peno li ne sukcesis ilin deĉifri.

Post plurtaga hezitado li decidis ĝin malfermi. Kaj post alia plurtaga penado li fine sukcesis.

La ĵeleo helverda — jen kion li trovis interne. S-ro N. proksimigis al ĝi sian nazon. Jenodoro fremda; nek bona nek malbona, nek klaras ĉu ĝi estas venena substanco aŭ ne.

Denove post hezito, li tuŝis ĝin per sia fingropinto. Kelkaj tagoj pasis, dume li nur rigardadis. Nek doloron nek jukon havis la fingropinto. Ĝi do ŝajnas esti sendanĝera, almenaŭ kontraŭ haŭto.

Nu, por kio do ĝi servas? Diversaj pensoj obsedis lin pri io kaj alio, kaj li absolute forgesis la forpason de la tempo. Ĉu ĝi estus eventuale manĝaĵo por urĝa okazo, preparita de kaj por kosmanoj? — li pensis.

Tiu penso plene lin okupis. Li tamen ne estis tiel senzorga tuj ĝin gustumi. Eĉ se manĝebla, ĝi tamen povus esti venena por terano, kiu sendube havus

alian konstitucion ol la kosmanoj. Kemia analizo devas esti plej efika metodo, sed la fotisto ne estis kompetenta en tio, kaj cetere la kosmoŝipo malhavis necesajn reakciilojn.

Pasis longa tempo antaŭ ol li plu ne povis toleri, kaj li ĝin leketis sur la langopinto. Tuj li lavis la langon, sed la gusto estis bona. Efektive ĝi impresis almenaŭ nemalbona sur lia lango, probable tial, ĉar la gustumilo sufiĉe travivis la monotonan kosmomangon.

Du tagoj pasis, sed la lango suferis nenian paralizon. Denove leketis s-ro N. Ripeta leketado tamen ne kontentigis. Iun tagon li do fine mangis... iom.

Apenaŭ pasis momento post la engluto kiam li pentis: Kial mi aŭdacis engluti? Sed la mangita kvanto jam restas en lia stomako! Kio povos nun sekvi?...

En granda maltrankvilo li atendis kio sekvus...

En unu el tiaj tagoj, kosmoŝipo aperis en la ĉielo. Alvenis la Savtrupo. "Surteriĝis la kosmoŝipo, aperis el ĝi ŝipano, kiu alparolis s-ron N.:

"Jen mi ĉi tie por savi vin. Longe vi atendis! Sed nun vi estas en absoluta sekuro. Nu ni startu!"

"Dankon! Sed antaŭ ĉio min ekzameni medicine, mi petas. Mi ja mangis iom el tiu strangaĵo. Necesas senprokraŝta kuraco, se ĝi estas venena."

S-ro N. montris al la ŝipano la ĵus parolitan objekton. Ĉi tiu vidis ĝin kaj diris:

"Nenia timo viaparte. Ĝi estas sendanĝera al la

homa korpo.”

“Sola deklaro viaflanke tamen ne sufiĉas min konvinki. Vi scias kio ĝi estas efektive, en la mondo?”

“Jes.”

“Kio do? Diru al mi, mi petas.”

“Mi diros tion nur kondiĉe, ke vi tenos la veron en absoluta sekteto. Ĉu vi ĵuras?”

“Jes, mi ĵuras, kompreneble.”

“La objekto estas dislokita de ni sur la surfaco de senhomaj astroj, por ke la akcidentviktimoj...”

“Tiel? Sed kial ne lasi kun ĝi ian instrukcion? Ties manko teruris min ĝis absoluta malespero!”

“La seneco de instrukcio havas gravan signifon. Tio helpos savi la viktimon okaze surteriĝintan, el eventuala frenezigo, kiun kaŭzos al li la soleco kaj senmezura tediĝo sur la dezerta astro...”

不测之祸

一艘小宇宙飞船在穿越宇宙的飞行中，突然撞上了陨石，受到骇人的震动。

“哎呀！出事儿了！”N先生坐在驾驶员的椅子上看着一组装置小声嘟哝着。

他是摄影师。他的工作是跟踪行星进行拍摄。

没什么大不了的，他自己在那儿瞎忙；要紧的是发电机和通讯系统有的地方发生了故障。使宇宙飞船暂时受到了影响。

虽然贮存的电能还可以工作一段时间，可是没有能力飞行了。

N先生拿出在发生危机的紧要关头所用的小册子，那里指示着该怎么做。喏，这就是他读到的东西：

“要镇静。先放闪光浮标向外部空间发信号。然后降落到最近的一颗星上，并在那儿等待着。你是一定会被找到并且得到援救的，因为当你到了日期而没有回到地球来，在旅行表上会马上被看到的。你所盼望的宇宙救护队会立刻出动，沿着你所走的路线寻找你。”

那么，简而言之，他是会得到救助的，只是需要等好长一段时间。除了遵守指令没有任何其它办法。

N先生想方设法把宇宙飞船降落到最近的一颗行星上。这是颗很小的星，荒无人烟，只有岩石；没有一处能找到有生命的东西。保留下来的电能在降落到这星上不久就耗尽了。然而他是很镇静的。贮存着很富裕的宇宙食品，在等待救护队到来的期间是足够吃了。

他拿出一点儿火箭燃料热些咖啡喝。

这时，他的心里立刻感到重新平静下来。他问自己，从现在起该干点什么？但是他找不到该做的事儿。他后悔，什么可读的东西也没带，可是后悔也无济于事了。

他在宇宙飞船里做体操直到疲倦就去睡觉。几天他都是以这样的方式度过的。每天都只是重复着吃饭、做体操和睡觉。没有什么比没音乐伴奏单调地做体操更使人感到无聊了，他不久就停止了做体操。

总是无事可做使他感到厌烦。那么他试着在宇宙飞船的壁上写字、画画来消遣，然而，这也没能持续多久。他看着自己乱写和乱画的东西一点儿也不感兴趣。很快N先生就用